

Esperanto por UN

Informilo de la oficejo de Universala Esperanto-Asocio por rilatoj kun Unuiĝintaj Nacioj

Numero 58, majo-junio 2022



Universala Esperanto-Asocio

Lastatempaj evoluoj en Esperanto

Komerco. Internacia Komerca kaj Ekonomia Federacio, kiu uzas Esperanton kiel sian laboran lingvon, elektis novan estraron por la periodo 2022-2025. Prezidanto estas s-ro Wang Tianyi (Ĉinio) kaj sekretario estas s-ro Enkhee Chimedtseren (Mongolio). La aliaj anoj de la 12-persona estraro estas el Brazilo, Kanado, Ĉinio, Irano, Japanio, Korea Respubliko kaj Pollando.

Radio: 100 Jaroj. La marta numero de la revuo *Esperanto* de Universala Esperanto-Asocio festis cent jarojn de Esperantaj radioelsendoj: la 19-an de junio, 1922, la radiostacio WJZ en Newark, Novjorzo, estis la unua, kiu uzis Esperanton. Poste venis la londona 2LO la 8-an de decembro samjare. Barbara Pietrzak, dum multaj jaroj la Esperanto-voĉo de Pola Radio kaj nun de Pola RetRadio, prezentas resumon de la historio de radioelsendoj en Esperanto, kaj ŝian artikolon suplementas tiun de Ariadna Garcia Gutierrez kaj Maritza Gutiérrez de Radio Havana Kubo kaj Veronika Poór de la reta stacio Radio Muzaiko, en ĝenerala diskuto pri radioelsendado per Esperanto – kampo kie virinoj ludis aparte notindan rolon.

Madagaskaro. Inter aliaj temoj tuŝataj en la marta numero de la revuo *Esperanto* estas la regula listigo de novaj libroj en Esperanto, ĝisdatigo pri la nunjara Universala Kongreso de Esperanto, okazonta en Montrealo, kaj intervjuo kun Henriel Fidalalao, redaktoro de la madagaskara informilo *Panoramo de la Granda Insulo*.

Eŭropa Unio. Seán Ò Riain, irlanda diplomato, kontribuante al la Konferenco pri la Estonteco de Eŭropo, alvokis al ekspansio de instruado de fremdaj lingvoj en la Eŭropa Unio kaj al la instruado de Esperanto, vidpunkto subtenata de la Kroata Esperanto-Ligo en lastatempa renkontiĝo kun Domagoj Hajdikovic, estro de la Oficejo por Eŭropaj Aferoj de la kroata parlamento. La Esperanto-movado daŭre emfazis kaj emfazas la gravecon de lingva inkluzivo, de multlingvismo kiel ilo por atingi tian inkluzivon je loka nivelo, kaj de Esperanto kiel internacia ligo inter la lingvoj.

Pollando: Interlingvistikaj Studoj. En Adam Mickiewicz Universitato (AMU), en Poznano, Pollando jam de 1998 funkcias internaciaj postdiplomaj interlingvistikaj studoj. Por la studjaro 2022/23 estas planate startigi 2-jarajn magistrajn studojn pri interlingvistiko por internacia studentaro, enkadre de la fako Lingvistiko kaj Informmanaĝado (en la Fakultato pri Modernaj Lingvoj kaj Literaturoj).

Kuriero de UNESKO: Biodiverseco. La plej lasta numero de *UNESKO-Kuriero* kiu lastatempe aperis en Esperanto-traduko pritraktas la restarigon de biodiverseco tra la mondo, per artikoloj pri indiĝenaj popoloj kaj la natura mondo, insulaj medioj, kaj la restarigo de la natura medio en Afriko kaj aliloke. Ne

estas tro malfrue por ekagi, laŭ la ĉefartikolo de la koncerna numero: “Longtempaj konservaj rimedoj sukcesas haltigi la malbonfartiĝon de iuj specioj minacataj de pereco. La protektataj areoj, kiuj hodiaŭ etendiĝas sur 17% de la tergloba surfaco, konsistigas bremson al la urba kaj agrikultura invado. Sed ja 100% da homoj hodiaŭ devas esti reamikitaj kun la vivantaro.” La Esperanto-eldono de la *Kuriero* estas regule eldonata de la Ĉina Internacia Eldona Grupo sub aŭspicio de Universala Esperanto-Asocio kaj sub redakto de Chen Yi. Aldone al la ses oficialaj lingvoj de UNESKO kaj al Esperanto, la *Kuriero* aperas en la kataluna, korea kaj portugala.

Esperantista sanktulo. En la unua kanoniza ceremonio en pli ol du jaroj kaj duono, okazonta la 15-an de majo, Papo Francisko deklaras Titus Brandsma sanktulo. Naskita en Nederlando en la jaro 1881, Brandsma elektis duoblan sed komplementan vivon: kiel monaĥo kaj ĵurnalisto. Profesoro de la nove fondita Katolika Universitato de Nijmegen, li fariĝis ĝia rektoro en 1932. Priskribante la Nazian reĝimon kiel “nigran mensogon,” li akre kritikis ĝian politikon, inkluzive ĝian antisemitismon. Li estis arestita en 1942, enkarcerigita, kaj fine sendita al la koncentrejo Dachau, kie post longa suferado li mortis. Kiel frua entuziasmulo de Esperanto kaj ties paca celo, li aktivis en IKUE, la Internacia Katolika Esperanto-Unio. Li publikigis artikolojn en la Esperanto-gazetaro kaj kunorganizis Esperanto-kunvenojn, inkluzive de la tutmonda esperantista katolika kongreso en Hago en 1937.

Universala Esperanto-Asocio festas Internacian Virinan Tagon kun sento de urĝo: Unuiĝintaj Nacioj “devas plenumi la laboron, por kio ĝi estis kreita.”

“Genra egaleco esencas por paca mondo, en kiu ĉiu persono povu labori kune por daŭripova estonteco en spirito de solidareco,” Universala Esperanto-Asocio deklaris en sia mesaĝo okaze de internacia Virina Tago la 8-an de marto 2022. “Universala Esperanto-Asocio salutas Unuiĝintajn Naciojn kaj donas sian subtenon al la ĉi-jara temo de la Tago: *Genra Egaleco Hodiaŭ por Morgaŭa Daŭripovo.*”

Sed la evoluo de aferoj en Ukrainio igis la Asocion aparte fokusiĝi je la situacio de virinoj en militaj zonoj, kaj tion fari kun aparta urĝo: “Ĉi-jare nia solidareco troviĝas unuavice kun tiuj virinoj en militaj zonoj kiuj luktas por ŝirmi siajn infanojn, kiuj klopodas defendi maljunulojn, kiuj volontulas por limigi la efikojn de milito eĉ dum milito daŭre furiozas ĉirkaŭ ili.” Krome, “Ili tion faras tuj post KOVIM, kiu alportis aflikton al multaj homoj, disrompis edukadon, kaj endanĝerigis infanojn tra la tuta mondo.”

Resume: “Milito kaj malsano minacas ĉiujn homojn: estas la tasko de ĉiuj, viroj same kiel virinoj, labori pace por superi tiujn minacojn.”

En tiel multaj mondopartoj, la potenco de la lingvo cedis al la potenco de perforto aŭ misuziĝas por disvastigi malordon. Ni salutas tiujn kuraĝajn virinojn kiuj protestas kontraŭ tiu malordo kaj kiuj pledas por restarigo de ordo en mondo en kiu finfine iliaj voĉoj estu aŭskultataj kaj la fortoj de detruo cedu al la voĉoj de ordo, paco, kaj egaleco.”

Revenante al la temo de la Virina Tago, la Asocio denove esprimis sian frustriĝon: “En tiel multaj mondopartoj, la potenco de la lingvo cedis al la potenco de perforto aŭ misuziĝas por disvastigi malordon.”

“Ni salutas tiujn kuraĝajn virinojn kiuj protestas kontraŭ tiu malordo kaj kiuj pledas por restarigo de ordo en mondo en kiu finfine iliaj voĉoj estu aŭskultataj kaj la fortoj de detruo cedu al la voĉoj de ordo, paco, kaj egaleco.”

Esperanto “Elemento en la kultura heredaĵo de la homaro” deklaris Lo Jacomo

Alparolante la Ĝeneralan Konferencon de Unesko en novembro en Parizo, François Lo Jacomo, reprezentanto de UEA apud Unesko, atentigis pri la multaj jaroj da kunlaboro de UEA kun Unesko, ekde 1954. Kiel ekzemplojn de tiu kunlaboro li citis la Esperanto-eldonon de *Unesko-Kuriero*, publikigon de historio de Unesko en Esperanto, kaj la fakton, ke tra la jaroj UEA publikigis 59 volumojn de klasikaj verkoj tradukitaj el multaj lingvoj en Esperanton. Li atentigis pri la kreskanta rolo de Esperanto kiel interafrika lingvo, citante ekzemplojn el Tanzanio, la Demokratia Respubliko de Kongo, Senegalio, kaj Burundo.

Mallonge, Esperanto estas “elemento en la kultura heredaĵo de la homaro.”

“Kunlabore kun Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj kaj Tutmonda Esperantista Junulara Organizo, kaj kun Unesko,” Lo Jacomo plue asertis, “ni [UEA] klopodas konstrui novan Mondcivitanecon kaj ni aktive partoprenas la Festivalon por la Paco, kiun grupo de NROj organizos venontjare, kun Esperanto kiel unu el ĝiaj laborlingvoj.”

Oficejo por rilatoj kun UN, Universala Esperanto Asocio, 777 United Nations Plaza, New York, NY 10017. [1] 212-687-7041. www.esperantoporun.org.